# *Kubo raportas 35 novajn kazojn de Covid-19 dum la lastaj 24 horoj*




Havano, a?g 12 (RHK) La nacia direktoro pri epidemiologio de la ministerio de publika sano de Kubo, dro. Francisco Durán, informis hodia? ke je la fermo de tiu ?i mardo, oni konfirmis 35 novajn kazojn pozitivajn de Covid-19 kaj la totalo akumulita restas je 3128 personoj.

Je sama dato, estas enhospitaligitaj por kontrolo epidemiologia 1135 pacientoj. Aliaj 11 501 personoj estas kontrolataj tra la baza sanatento.

En tiu tago oni analizis 4256 samplojn, el ili 35 estis pozitivaj kaj la lando jam akumulas 309 908 studitajn samplojn kaj 3128 pozitivojn.

En Kubo ?is hodia?, el ?iuj konfirmitaj kazoj 83,7% estas kontaktoj de anta?aj pozitivoj dum totalo de 310 personoj estis konta?itaj eksterlande. El la totalo konfirmita 57,5% estis sen simptomaj.

La nombro da forpasintoj entute estas je 88, kun indikilo de morteco je 2,81% sub la nivelo de la amerika regiono. Kubo restas je la pozicio 21 rilate la mortec-indikilon en la regiono kaj en la pozicio 113 en la mondo. Restas la nombro de du eksterlandanoj evakuitaj al siaj respektivaj

landoj kaj 2504  jam rekuperi?intaj (32  pliaj hiera?). Kvar  pacientoj  estas en grava stato kaj 2 en kriza stato.

?is sama dato la mondo akumulas iom pli ol   20 milionojn da konta?itoj pro tiu ?i malsano kun indikilo de morteco je  3,66 % dum la amerika regiono havas iom pli ol 54% el ?iuj kazoj en la mondo. La nombro da konfirmitoj estas pli ol 10 milionoj. La nombro da forpasintoj  en la regiono montras indikilon de  morteco je  3,64%.

Kubo  trapasas rekuperi?an etapon, tamen,   Havano retroiris al fazo de loka transmisiado,  dum  la najbara provinco Artemisa retroiris al la dua fazo kaj ?ia municipo Bauta al la 1-a fazo pro la malfavora evoluo dum la lastaj du semajnoj.

Spite al la favora evoluo de la malsano en 10 provincoj, oni  proponis intensigon de la kontroloj epidemiologiaj tutlande, kaj anka? reduktigon de la movebleco inter la okcidentaj provincoj, speciale en  Havano.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/231358-kubo-raportas-35-novajn-kazojn-de-covid-19-dum-la-lastaj-24-horoj

**Radio Habana Cuba**